

5-a PASKA DIMANĈO – 24-a de aprilo 2016

NOVAN ORDON MI DONAS AL VI: KE VI AMU UNU LA ALIAN.

Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 13, 31-33a.34-35

Kiam Judaso estis elirinta [el la vespermanĝejo], Jesuo diris: „Nun la Filo de la homo ricevas gloron de Dio; kaj ankaŭ la gloro de Dio montriĝas pere de la Filo. Se la Filo de la homo montras la gloron de Dio, ankaŭ Dio gloros Lin. Infanoj, ankoraŭ mallongan tempon Mi estas kun vi. Vi Min serĉos, sed kiel al la Judoj Mi diris, tiel Mi diras ankaŭ al vi: kien Mi iras, tien vi ne povas iri. Ordonon novan Mi donas al vi: ke vi amu unu la alian, kiel Mi amis vin. Ke vi same amu vin reciproke. Per tio ĉiuj scios, ke vi estas miaj disĉiploj: se vi havos amon unu al alia.”

En sia 13-a ĉapitro Johano prezentas la lastan vespermanĝon de Jesuo kun siaj disĉiploj. Jesuo ĝis la lasta momento klopodas proponi sian amon ankaŭ al la disĉiplo Lin perfidonta, Judaso. Li proponas la panon, simbolon de Sia vivo, sed Judaso ne manĝas tiun panon, do ne enprenas Jesuon, kaj eliras. Johano diras: “*kaj estis nokto*” (Joh 13.31).

“*Kiam Judaso estis elirinta [el la vespermanĝejo], do li estis preninta, sed ne enpreninta, la panon, kaj foriris por Lin perfidi, Johano asertas, ke “Jesuo diris: „Nun... En la tuta Evangelio estas anoncata tiu “nuno” de Jesuo, kaj Johano deklaras, ke nun ĝi plenumiĝas. Jesuo nomas sin mem ...: ...la Filo de la homo ...”.* Kial Li uzas tiun esprimon, al Li tre karan?

“Filo de la homo” estas la homo kun dia eco. Do Jesuo estas la filo de Dio, estas Dio kiel homo; li estas la “filo de la Homo”, do la homo kun dia eco.

Ĉar ĝuste en la senkondiĉa amo, proponita ankaŭ al la malamiko, manifestiĝas la gloro de Dio: la gloro estas la videbla manifestiĝo de la eco de Dio. Kaj kio estas Dio? Dio estas la amo ankaŭ al la malamiko, al la

perfidanto de la "Filo de la Homo" "...ricevas gloron de Dio; kaj ankaŭ la gloro de Dio montriĝas pere de la Filo. Se la Filo de la homo montras la gloron de Dio, ankaŭ Dio gloros Lin" ricevas gloron. Kial Jesuo tion asertas, kiam Judaso Lin perfidis por Lin mortkondamnigi?

Johano prezentas daŭran dinamikon en la vivo de Jesuo, kaj la samo devas okazi ankaŭ por la kredanto: de amo ricevita al amo transdonota. La posta versiklo mankas en multaj manuskriptoj, kaj ĝi estas ripeto de io jam dirita: "Se la Filo de la homo montras la gloron de Dio, ankaŭ Dio gloros Lin" kaj tio okazos tuj. Kiel? Ĉar Jesuo kapablos alfronti la morton, kiu estos ne fino, sed komenco: pere de la morto de Jesuo la Spirito ŝvebos super Lia komunumo.

Kaj Jesuo, unuafoje, kaj ankaŭ lastafoje, uzas teneran esprimon "Infanoj, ankoraŭ mallongan tempon Mi estas kun vi. Vi Min serĉos, sed... kiel al la Judoj Mi diris, ..." (Li komparas la disĉiplojn al al malamikoj, la eminentuloj "...tiel Mi diras ankaŭ al vi: kien Mi iras, tien vi ne povas iri. Kial ili ne povas iri? La disĉiploj estas pretaj al morto por Jesuo, sed ne al morto kun Li kaj kiel Li. Tial ili ne povas iri kien iras Li. Kaj ni venas al la konkludo de tiu ĉi mirinda ĉapitro, la 13-a, kun la anonco nova de Jesuo.

"Ordonon novan... Rimarku: Li ne diras "novan ordonon", kvazaŭ por diri, ke ekzistas la ordonoj de Moseo kaj jen unu plia, male: jen unu, kiu anstataŭas ilin ĉiujn. Ni memoru la prologon: "La leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo" (Joh 1, 17). "... Mi donas al vi: ke vi amu unu la alian, kiel Mi amis vin. Ke vi same amu vin reciproke."

La nova rilato establita de Jesuo kun la Patro kaj kun la disĉiploj ne povis trovi lokon en la antikva alianco, ĝi postulas aliancon novan, kies esprimo estas unu nura ordono nova, antaŭ kiu ĉiuj antaŭaj malaperas.

Novan ordonon Mi donas al vi: ke vi amu unu la alian,. Grava rimarko: Jesuo ne aludas ion estontan, li ne diras "kiel Mi amos vin". Li ne antaŭanoncas Sian morton, la plenan oferon farotan surkruce, sed "kiel mi vin amis". Kaj kiel Li amis? Ni memoru la la lastan vespermanĝon en la rakonto de Johano, kiam Jesuo lavis la piedojn de la disĉiploj. La amo ne estas reala, se ĝi ne iĝas servo, puriganta la vivon de la aliaj.

"...kiel Mi amis vin, ke vi same amu vin reciproke". Tia estas la amo, kiun Jesuo postulas. La reciproka servo estas kio distingas la kredanton en la komunumo de Jesuo. Kaj tuj sekvas la konfirmo: "Per tio... do per la amo iĝanta servo "...ĉiuj scios, ke vi estas miaj disĉiploj: se vi havos amon unu al alia."

Do la deklaro de Jesuo ne lasas dubojn, ne allasas aliajn distingilojn. Do NE insignoj, kostumoj, signoj, devizoj, kiuj intencas evidentigi la rilaton kun la Sinjoro, sed nur amo servanta. Kiam oni elektas tiujn anstataŭaĵojn, eklumu alarmolampeto: la amo servopreta ne estas la vera kutima distingilo de la kristana komunumo.

Do unu sola estas la ordono, ankaŭ tiu anoncita en la prologo: "La vorto fariĝis karno" (Joh 1, 14), kaj tiu vorto esprimigas per unu sola ordono, kaŝanta ĉiujn aliajn.